SK-10/18

LA RONDO

Esperantista danco

Elpensita de sinjoro Rafel Tudó y Duràn, direktoro de l'« Esbart Català de Dançaires » de Barcelono, lau pirineaj popolaj arioj kaj dancoj, kaj enharmoniigita de profesoro Leopold Botey : : :

Desegnaĵoj de sinjoro Ismael Smith

Eldono de la komitato
: de la V^a Kongreso :

Barcelono

GRUPO SEVILLA ESPERANTISTA



Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto - Federacio

Rodríguez San Pedro 15 - 3º - 7, E-28015 MADRID
Tel. +34 - (9)1 - 4456079

LA RONDO

Esperantista danco

Elpensita de sinjoro Rafel Tudó y Duràn, direktoro de l'« Esbart Català de Dançaires » de Barcelono, lau pirineaj popolaj arioj kaj dancoj, kaj enharmoniigita de profesoro Leopold Botey

Desegnaĵoj de sinjoro Ismael Smith


Eldono de la komitato
de la V^a Kongreso

Barcelono

Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto-Federacio
Rodriguez San Pedro 13 - 3º - 7, E-28015 MADRID
Tel. +34 - (91) - 4498073

GRUPO SEVILLA * ESPERANTISTA

Al Grupo Esperantista
de Sevilla
El Autor



Tiun ĉi dancon elpensis sinjoro Tudó pruntinte la ariojn kaj movojn el la lando mem. «Esperantista danco — diras la komitato de l'*Esbart Català de Dançaires*, kies Prezidanto estas sinjoro Tudó — devas grafike montri per la pozoj la idealon de la Internacia Lingvo, kaj esti alegorio.» Ni opinias, ke sinjoro Tudó sukcesis, kaj ni esperas, ke ĉiu ĉie rondedancos frate kaj gaje. La folkloristoj retrovos en la ario tiun de *La Bulangera (La Boulangère* en franclando) kaj tiun de *L'Indiot*, dancoj el la Graflando de *Pallars* retrovitaj de Pastro Vicents Bosch kaj sinjoro Enrich Vigo kaj premiitaj en la «Festo de la Kataluna Muziko» fondita de l'*Orfeó Català* per la premio de «Ekskursa Klubo de Katalunujo». Ankaŭ la movoj estas tiuj de ambaŭ dancoj. Ni publikigas per tio ĉi la esprimon de nia plej kora danko al elpensintoj, kiuj malavare donacis al la Kongreso ĉiun rajton pri *La Rondo*, kaj al nia samlandano sinjoro Ismael Smith, kies artajn desgnaĵojn, ankaŭ malavare donacitajn al la Kongreso, certe admiros pro ĝia originaleco kaj artisteco ĉiu kongresano.

La loka Komitato.


Mod. (1.92)
A
B.
C.
D.
E.
I
II
III

La Rondo estas dancota de paroj da gedancistoj, kaj ĝia muziko konsistas el tri partoj, kiuj sin ripetadas senfine, ĝis kiam dancistoj kaj muzikistoj estas elĉerpinte sian tutan forton. Oni povas haltigi ĝin ĉu interkonsente ĉu laŭvole; kaj okazas al *La Rondo* tio, kio okazas al preskaŭ ĉiu danco: muzikistoj povas ludi sen dancistoj, sed tiuj ĉi malfacile povas danci sen muzikistoj.


Ni imagu, por la plej bona komprenigo de la danco, ke tiun ĉi ekdancas kvar paroj da gedancistoj, kiujn ni nomos: *paro* 1ª, *paro* 2ª, *paro* 3ª kaj *paro* 4ª.



Ia Parto

(8 taktoj, de la litero A ĝis la litero B)


La gedancistoj tenas siajn manojn unu la alian, formante rondon,




Rondo

tiamaniere ke ĉiu sinjoro donas sian dekstran manon al sia sinjorino, kaj sian maldekstran al la sinjorino el alia paro. La rondo turniĝas polke kurante dekstren.

Kiam la parto estas finita (litero B), ĉiu dancisto liberigas sian malkestran manon kaj ĉiu dancistino sian dekstran, kaj sekve la rondo rompiĝas kaj ĉiu paro restas izolita. Tiam la paroj levas la interajn brakojn, kies manoj ankoraŭ estas prenitaj, kaj la dancistino pasas sub la arko farita de ŝia maldekstra brako kaj la dekstra de ŝia dancisto. Tiun ĉi movon ni nomos: *ŝraŭbo*, kaj oni faras ĝin dum la takto montrita inter du * (de B ĝis C).



Ŝraŭbo






II[a] Parto

(8 taktoj, de la litero C ĝis la litero D)

Farinte la *ŝraŭbon*, la sinjorino de la *Paro 1[a]*, restas kontraŭ la sinjoro de la *Paro 4[a]*, la sinjorino de la *Paro 2[a]*, kontraŭ la sinjoro de la *Paro 1[a]*, k. t. p., kaj kompreneble, ĉiu sinjoro restas kontraŭ la sinjorino, de la *Paro*, kiu dancis la unuan parton je lia dekstra flanko. Tiam, unu kontraŭ la alia, kaj ne foriĝante el la loko, ĉiu gedancisto saltas laŭ polka takto kun malgranda movo dekstre-maldekstren kaj male: oni

komencas polki per la dekstra piedo, kiun oni antaŭenigas; poste oni antaŭenigas la maldekstran, k. t. p., ĝis kiam la parto finiĝas (litero D).

Tiam ĉiu dancisto prenas per sia dekstra mano la maldekstran manon de la dancistino, kiu estas kontraŭ li (t. e.: la sinjoro de la *Paro 1ª* prenas la manon de la sinjorino de la *Paro 2ª*, la sinjoro de la *Paro 2ª* prenas la manon de la sinjorino de la *Paro 3ª*, k. t. p.). Ili levas la brakojn, kies manoj estas prenitaj, kaj la sinjorino pasas sub la arko de la brakoj, farante novan *ŝraŭbon* dum la takto montrita inter du * (litero D. ĝis E).



Rigardado



III[a] Parto


(16 taktoj, de la litero E ĝis la litero F)

Farinte la duan ŝraŭbon, ĉiu dancisto sin trovas apud la sinjorino de la paro, kiu dancis antaŭe ĉe lia dekstra flanko. Sekve, la dancisto de la *Paro 4[a]* renkontas la dancistinon de la *Paro 2[a]*; la dancisto de la *Paro 3[a]*, la dancistinon de la *Paro 1[a]*. (Se la paroj estas multenombraj ili troviĝas pli malproksime.) Tiam, la dancisto prenas per sia maldekstra mano la dekstran manon de la dancistino, kaj li ĉirkaŭprenas per la dekstra mano ŝian talion; la dancistino prenas per sia dekstra mano la maldekstran de la

dancisto kaj ŝi apogas sian maldekstran manon sur la dekstran ŝultron de la dancisto. En tiu ĉi pozo, la paroj, sin sekvante unu la alian, polke kuras dekstren kaj ronde.

Kiam tiu ĉi parto estas finita (litero F) la dancisto prenas per sia dekstra mano la maldekstran manon de la dancistino, kiu pasante sub la arko de la levitaj brakoj faras novan trian ŝraŭbon dum la takto montrita inter du * (litero F ĝis G).

Farinte tiun *ŝraŭbon*, okazis nova interŝanĝo de gedancistoj, kiuj ronde sin prenante reciproke la manojn, komencas danci la unuan parton, k. t. p.



Parkurado

Klarigoj

La nombro da paroj povas esti senfina.

En la danco estos tiom da dancistoj, kiom da dancistinoj; sekve, oni alvenos al la rondo po paroj.

La paroj povas eniri en la rondon, kiam ili volos, kvankam la danco estas komencita. Estas konsilinde tamen, ke oni eniru nur dum la unua parto (litero A ĝis B) por eviti ĉiun konfuziĝon kaj interrompon. Enirante, la paro zorgos disparigi neniun paron kaj sin loki tiamaniere, ke dancisto troviĝu inter du dancistinoj kaj male.

La danco finas kiam la muzikistaro ne ludas plu. Ĉe la fino povas okazi, ke ĉiu dancisto restas kun dancistino, kiu ne estas tiu, kiun li invitis al la dancado. En tiu okazo, la dancisto trairos la salonon aŭ placon akompanante la dancistinon ĝis kiam tiu ĉi renkontos la danciston, kiu invitis ŝin. Tiam okazos interŝanĝo de dancistinoj, kaj la interŝanĝado daŭros ĝis kiam la dancisto renkontas sian invititinon. Tiu ĉi fino de *La Rondo* ebligas ĝentilajn kaj internaciajn interparoladojn kaj respondas al la celo de Esperantistaj kunvenoj.





F. GIRÓ, IMPRESSOR
CARRER DE VALENCIA, 233
BARCELONA

0'120. 5.